

Pentekosto

Kial oni festas la kristnaskon kaj la paskon, tio estas al multaj konate; sed pro kio la pentekosto?

Unu festotago pli, cetere...

Je la pentekosto – 50-a tago post la pasko,

oni rememoras la donacon de la Sankta Spirito kaj publikan agadon de kristanoj, kiu tiam komenciĝis. Niatempe oni festas tion kiel familian festotagon kun diversaj tradiciaj programoj kaj kutimoj.

Sed se oni volas pli ekscii pri la signifo de la pentekosto, oni devas reveni al la fontoj. Pri tiuj eventoj raportas la Biblio, en la libro *Agoj de apostoloj*, en la 2-a ĉapitro. Kvazaŭ ŝtormo la kredprediko de la apostolo Petro forbalais la tiamajn religiajn tradiciojn.

Kara leganto, kara legantino, lokigu vin komforte kaj metu vin en imagitan situacion de observanto de la eventoj en Jerusalemo proksimume 30 jaroj post la naskiĝo de Kristo.

Okazas io eksterordinara

Disĉiploj de Jesuo estis kolektitaj en salonego en Jerusalemo, atendante tie, kiel ordonis Jesuo. Subite ekzumis en la domon kvazaŭ forta ŝtormo kaj oni vidis super siaj kapoj ion kvazaŭ flamoj. La ĉeestantoj komencis paroli en lingvoj, kiujn ili neniam lernis kaj en forta ĝojo anoncis la ĝojan predikon pri la grandaj faroj de Dio. Ĉiu povis la disĉiplojn kompreni en propra lingvo. Unue la disĉiploj rikoltis primokadon kaj priridon. Ankaŭ niatempe tio ne funkcias alie. Kiu finfine parolas okaze de grandaj festotagoj pri Dio? Oni ĝojas pro renkontiĝoj kun konatuloj, oni laŭdas aŭ kritikis koruson, oni sin esprimas pri vestoj, portataj de la ĉeestantoj... Estus tre eksterordinare, se Dio fariĝus ĝenerala temo de interparoladoj.

Ĉu la religieco sufiĉas?

Eble ĉio-ĉi okazis tiel: Petro staras sur ŝtuparo kaj tiel elstaras el la homamaso, kolektita dense ĉirkaŭ li. Li rapide altiras atenton de la aŭskultantoj: „Aŭskultu! Pri kio li do parolas?” Leĝera konversacio de festogastoj subite estingiĝas. La homoj engaĝite rigardas al Petro. Liaj vortoj estas klaraj. Li parolas pri signoj de la venonta juĝo kaj kiel estas skribite, ke elverŝiĝo de la Spirito de Dio faras homojn pretaj por konvertiĝi.

Tiuj ĉi vortoj trafis korojn. Tio simple estis vera. La homoj havis sian religion – kiel ĉiuj aliaj same – kaj ili dum la festotagoj frekventis la templon. Jen, tio ne estis malbonaj homoj, ili havis neniun kontraŭrimarkon pri Dio. „Nur ne fariĝi ekstremulo,” ili opiniis kaj neniam starigis demandon, kion Dio de ili volas. Baze multaj estis koncerne Dion indiferentaj.

S O S ?

Kaj nun ĉi tie staras la homo, kiu invitas la pasantojn ke ili voku al Dio por ricevi savon. Voki por ricevi savon? – Tio aŭdiĝas iel strange. Kiel SOS! Tiu, kiu troviĝas en granda danĝero, komencas voki por helpo. Tio estas kristale klara. Sed paroli tiamaniere kun Dio? Voki al la Sinjoro, por ke oni estu savita?

Ĉu vi havas vian vivon subkontrole?

Kiu estas la Sinjoro?

Nun venas la surprizo. Petro prezentas al tiuj, kiuj lin aŭskultas, la viron „Jesuo el Nazareto” kiel Savanton. Tiun Jesuon, kiun ili antaŭ 50 tagoj mem mortigis, lin kvazaŭ krimulon najligis sur la krucon. Petro atestas, ke tiu ĉi Jesuo vivas! Lia releviĝo estas la pruvo, ke li estas tiu de Dio sendita Savanto. Petro argumentas citante el la Biblio, kiu – ĝis multaj detaloj – jam jarcentojn antaŭe anoncis lian naskiĝlokon, originon, vivon de Jesuo, lian morton kaj resurekton!

Ĉu ni tion faris?

Kvazaŭ fulmtrafitaj tiuj, kiuj aŭskultis, sin demandis, kiamaniere estis eble, ke ili frenezkriis: „Krucumu lin!” Kiel ili do povis tiel erare ekspliki la Skribon, se ĉiuj unuopaj detaloj montras al tiu ĉi viro el Nazareto?

Kaj nun ili demandis al Petro, kiamaniere ili povus esti savitaj per tiu ĉi releviĝinta Jesuo Kristo.

„Konvertu vin el via plena koro al Dio!” li respondis.

Komplete kaj tute

Ili devis lerni kompreni, ke aparteno al hebrea religio, estimado de festotagoj, partopreno ĉe kelkaj kultaj agoj kaj ritoj kaj la tuta propra klopodado por atingi al Dio plaĉan vivon – la vivon ne savas – tion oni povas ricevi nur per persona rilato al la releviĝinta Sinjoro. „La savanta kredo” signifas, ke ni komplete kaj en tuto nin apogas je tio, ke Jesuo volas per sia surkruca morto ĉiun homon venigi en novan, nedisigeblan rilaton kun Dio. Tiu rilato komenciĝas, kiam homo sin persone turnas al Dio kaj petas ĉe Jesuo Kristo por pardono de siaj pekoj. (Rigardu la aldonan tekston „Ŝanco por via vivo” kiel skizan kondukon al konvertiĝo!)

„Kiu havas la Filon, tiu havas la vivon” (1 Johano 5,12).

Tio ĉi estas vere bona novaĵo kaj povas radikale ŝanĝi la homan vivon. – Kaj se oni malsukcesas? Dio jam anticipe zorgis ankaŭ por tia kazo: la ofermorto estas plenumita, la neimageble alta prezo pagita. La homo devas kaj povas kontribui nenion el sia povo, li povas nur en dankemo persone akcepti la oferton de Dio per Jesuo. Tio estis la mesaĝo de la pentekosta festo kaj restis ĝis niaj tagoj senŝanĝita.

Kara leganto, kara legantino, mi deziras al vi belan tempon dum pentekosta festado!

D-ro Christian Faffelberger, veterinaro en Karintio en Aŭstrio

Ŝanco por via vivo

Dio vin amas

Vi estas la penso de Dio; Li planis vin kaj vin tiel mirinde kreis. Li amas vin forte kaj sopiras je tio, ke Li estu en komuneco kun vi. Sed tiu komuneco estas disŝirita. Via vivo fluas preter la celo. La Biblio tion nomas „la peko”, la maltrafo de la celo.

Dio vin pridonacas

Pro tio Li sendis sian Filon Jesuon Kriston. Pro nia kulpo Jesuo mortis surkruce kaj tiel supervenkis la disigitecon. Nun vi povas denove havi ligon kun Dio.

Faru vian decidan paŝon!

Komencu vian vivon kun Jesuo kaj alpreĝu lin propravorte laŭ ĉi-suba ekzemplo:

„Pardonu al mi mian kulpon, miajn arbitrajn vojojn kaj ĉion, kio ĉe mi ne plaĉas al vi! Dankon, ke vi akceptas min tia, kia mi estas. Transprenu nun kondukadon de mia vivo kaj transformu min! Dankon, ke vi donacas al mi novan perspektivon kaj la eternan vivon!”

Dio zorgas por vi

Komencu regule legi en Sankta Skibo! Tie vi trovas la Dian planon por via nova vivo. Komencu frekventi biblian kurson aŭ pribibliajn interparolojn. Preĝante parolu kun Jesuo! Vi povas diri al li ĉion, kio vin koncernas. Kaj serĉu kontakton kun aliaj, kiuj samtiel komencis novan vivon kun Jesuo!

Kun permeso de laborgrupo „Evangelium in jedes Haus” (Ek evangelion en ĉiun domon) en Regau tradukis el la germana Vinko Ošlak.

Klagenfurt / Celovec / Klaŭdiforomo (Aŭstrio), okaze de pentekosta festotago 2009

Bonvolu viziti la estiĝantan hejmpaĝon de Kristana misio en Esperanto sub la retadreso:

www.kristana-misio-en-esperanto.si

kaj ne forgesu informi kaj instigi pri tio viajn amikojn kaj samideanojn!